

Eduard Ebel,
Ŝvebas neĝ' el aer'

tradukita de Joachim Gießner

Ŝvebas neĝ' el aer',
nun ripozas la ter'.
Mondo en brilblanka vest',
ĝoju, ja venos kristfest'.

Varma lum' en la kor',
for ĉagreno kaj plor',
ĉesas de l' viv' la molest',
ĝoju, ja venos kristfest'.

Baldaŭ nokto de l' glor'.
Kaj el ĉielo la ĥor
Sonos en dolĉa majest',
Goju, ja venos kristfest'.

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, *1839 - †1905) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 - †2003-11-25).*

MR-012-JG-1 / Arg-99-200 (2012-12-24 16:27:56)

MR-012-JG-1

Eduard Ebel,
Milde falas la neĝ'

tradukita de N. N. 01

Milde falas la neĝ',
Lago silentas en preĝ',
Arboj en brilblanka vest'.
Ĝoju pri kristnaska fest !

Nun varmiĝas la kor',
Ĉesas ĉagren' kaj dolor',
Ĝoju pri Dia ĉeest'.
Ĝoju pri kristnaska fest!

Sankta nokto de Di',
Vekas anĝelĥoron ĝi,
Sonas ĉarmega atest':
Ĝoju pri kristnaska fest'!

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, *1839 - †1905) en Esperanton de N. N. 01.*

MR-012-NN-1 / Arg-99-201 (2003-12-11 08:46:13)

MR-012-NN-1

Eduard Ebel,
Flustre falas la neĝ'

tradukita de Josef Kühnel

Flustre falas la neĝ'.
Lag' rigidas laŭ leĝ'.
Kristfeste brilas arbar'.
Ĝoju pri Kristo, homar'!

Varma estas en kor'.
Foras ĉiu dolor'.
Fuĝas la vivoamar'.
Ĝoju pri Kristo, homar'!

Sankta nokta lumbril'
kaj ĉiela jubil'
logas laŭ ĉarma fanfar':
Ĝoju pri Kristo, homar'!

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, *1839 - †1905) en Esperanton de Josef Kühnel.*

MR-012-JK-1 / Arg-99-202 (2010-09-18 19:50:56)

MR-012-JK1